

Pri elreviga eksperimento koncerne la instruadon de Esperanto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 720, 1977.07.27 & 29 & 30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Antaŭ deko da jaroj lerneĵ-inspektoro faris al mi entuziasmigan proponon, ke mi eksperimente instruu geografion en esperanto kiel sekvo al eksperimenta instruado de esperanto. Mi tuj akceptis tiun ĉi proponon, sed rapide mi devis elreviĝi, jen kial :

A.- La elreviĝo ne estis lingva, sed praktika kaj metodologia. Ekzistas nenia materialo por instrui geografion en esperanto. Ĉio estis farota. La nura pretigado de la instrumaterialo multe superis la laborforton de unuopulo. Ne la gelernantoj ne povis sekvi la kurson, sed la instruisto. La verkado de la materialo por unu leciono ofte reprezentis dekojn da laborhoroj noktaj, kaj tamen la rezulto restis nekontentiga, ĉar gravaj kaj fundamentaj punktoj restis sen solvo.

Cl.- Tial mi devis rezigni je la daŭrigo de la eksperimento. La lerneĵ-inspektoro prave konkludis, ke la afero ne jam maturis. Li min kuraĝigis daŭrigi la poresperantan laboron kaj trovi aliajn kolegojn por la pretigado de instrumaterialo eksperimentota, kiam ĉio estos pli matura.

A.- Jen tre resume prezento de la situacio, kiun necese alfrontos instruistoj, kiam ili volos instrui geografion en esperanto.

Cl.- Unue ili troviĝos antaŭ kaosa geografia nomenklaturaro. Depost mia malagrabla aventuro la situacio tamen iomete pliboniĝis, ĉar en 1968 aperis *Mondmapo* eldonita de la fantoma Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj. En 1971 eldoniĝis en Praho *Poŝatlaso de la Mondo*. Fine en *Plena Ilustrita Vortaro* estas troveblaj multaj geografiaj nomoj. La nuna laboro konsistis en la komparado de tiuj ĉi nomenklaturaroj kaj en la elektado de la plej taŭgaj solvoj.

A.- Antaŭ ĉio tiun ĉi komparadon kaj elektadon oni devus povi fari en la kadro de labor-grupo, kies anoj apartenus al plej diversaj naciaj lingvoj.

Cl.- Mi faris tre interesan malkovron, ke la simpla fakto, ke oni elektas esperanton kiel instrulingvon, alportas ĝisfundajn ŝanĝojn en la instruprogramon.

A.- Jen kial. La nacilingva instruado de geografio ĉion rilatigas al la propra nacio. Svisa lernanto unue intimiĝas kun sia kantono, poste kun la najbaraj kantonoj, kun sia federala lando, kun la nacioj najbaraj, kun Eŭropo kaj fine kun la aliaj kontinentoj. Por li Svislando estas la umbiliko de la mondo. La graveco de la ceteraj landoj dependas de la rilatoj kun la propra lando. Tiu ĉi naciista prezento de la monda geografio komplete falsigas la faktojn.

Cl.- Kiam oni pretigas instrumaterialon, kiun iu ajn instruisto en iu ajn lando povus siavice uzi, oni ne povas konservi naciistan vidpunkton. Mi tiam ekkonsciis pri la graveco de la instru-revolucio, kiu sin kaŝas malantaŭ esperanto. Geografia lernolibro en esperanto devus esti universale akceptebla, tio signifas, ke ĝi ne rajtas plu konduki la gelernantojn al trompa analizado de geografiaj faktoj. La planedo Tero ne plu havas umbilikon.

A.- Anstataŭ iri de la regionaj ecoj al la universalaj, oni devas kontentiĝi je la universalaj, lasante al la nacilingva instruado la studadon de la regionaj.

Cl.- Jen en kelkaj vortoj la instruplano, kiu rezultis el miaj longaj meditadoj.

A.- Ĝi prezentus unue la planedon Tero, ĝin situigante kun ties satelito Luno en la Sun-sistemo.

Cl.- Poste oni studus la ĝeneralajn karakterizaĵojn de la planedo Tero : la kontinentojn kaj oceanojn, ties reliefon. Oni lernus fundamentan nomenklaturon : la nomojn de la ĉefaj maroj, montaroj, riveregoj kaj lagegoj, ebenaĵoj, dezertoj kaj ĉefaj urboj.

A.- Sekvus studoj pri la klimatoj sur la tero, ekde tiu de ekvatoro, ambaŭflanke al tiuj de la diversaj zonoj tropikaj, mezvarmaj, malvarmaj kaj polusaj. Intimiĝo kun la horzonoj ankaŭ estus necesa.

Cl.- Sekvus studado de diversaj mondmapo : La kresk-teritorioj de gravaj arboj kaj plantoj : oranĝ-, banan-arboj, tritiko, vito, ktp. Aliaj mapoj montrus la disvastiĝon de la ĉefaj homaj karakterizaĵoj : raso, lingvoj, religioj, vivniveloj, loĝdenseco, ktp. La gelernantoj malkovrus, ke ne ekzistas rilatoj inter la raso kaj la aliaj faktoroj lingvoj, religioj, vivniveloj, ktp.

A.- Sekvus fine politikaj mapoj, kiuj montrus la naciojn laŭ ties grupiĝoj en vastaj organizaĵoj : Amerika, Afrika, Usono, Komekon, Eŭropa Komunumo, ktp. Alfabeto en speco de enciklopedio sekvus priskribo de ĉiuj landoj. Oni bone reliefigus, ke lando ne respondas al la lingvaj teritorioj. La franca estas parolata ekstere de Francio, kaj en Francio estas parolataj ne nur la franca, sed ankaŭ la kataluna, la bretona, la germana.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !